

***KION DIO KUNIGIS, TION HOMO NE DISIGU.* Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

El la evangelio laŭ Marko 10, 2-16

En tiu tempo alproksimiĝis al Jesuo kelkaj fariseoj. Ili, por embarasigi Lin, demandis Lin: „Ĉu estas permesite al viro divorci de sia edzino?“

Jesuo respondis per demando: „Kion Moseo ordonis al vi en la leĝo?“

Kaj ili respondis: „Moseo diris: Se iu volas divorci de sia edzino, li skribu eksedzigan deklaron. “

Tiam Jesuo diris: „Pro la malmoleco de via koro li skribis por vi ĉi tiun ordonon. Sed komence, en la tempo de la kreo, ne estis tiel. Dio kreis la homojn viro kaj virino. Pro tio la viro forlasas sian patron kaj sian patrinon kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno. Sekve ili jam estas ne du, sed unu karno. Kion Dio kunigis, tion homo ne disigu.“

Kiam poste ili revenis en la domon, la disĉiploj denove demandis Jesuon pri la afero. Kaj Li diris al ili: „Kiu forsendas sian edzinon kaj edziĝas kun alia, tiu adultas kontraŭ ŝi; kaj se ŝi forlasas sian edzon kaj edziniĝas kun alia, ŝi adultas.“

Kelkaj portis al Li infanojn, por ke Li tuŝu ilin. Sed la disĉiploj riproĉis ilin. Kiam Jesuo ekvidis tion, indignis kaj diris al ili: „Lasu la infanojn veni al mi; ne malhelpu ilin, ĉar al tiaj apartenas la regno de Dio. Jes, Mi diras al vi: Kiu ne akceptas la regnon de Dio kiel infano, tiu ne eniros ĝin.“

Poste Li brakumis la infanojn, benis ilin, metante la manojn sur ilin.

Ĉiun fojon kiam Jesuo anoncas sian mesaĝon, la bonan novaĵon de Dio, tio estas lia amo por la tuta homaro, jen ke en la evangelio de Marko ekaperas ĉiam la malamikoj de tiu ĉi mesaĝo. Kaj ili ne estas la pekantoj, sed estas ĝuste la piaj personoj, la fervoraj gardantoj de la leĝo, la fariseoj.

Ni vidu kion skribas al ni evangeliisto Marko. *Alproksimiĝis ... kelkaj fariseoj*, do tiuj personoj kiuj efektivigis ĉiujn ordonojn kaj la observemojn de la leĝo, *por embarasigi Lin*, la verbo embarasigi aperis la unuan fojon komence de la evangelio kiel agado de Satano, de la diablo, la evangeliisto atribuas ĝin poste al la fariseoj. Kial tiuj personoj kiuj estis taksataj sanktaj, la tieepokaj derviŝoj, admirataj pro iliaj observemoj, estas male por la evangeliisto kaj por Jesuo nuraj iloj de la diablo? Ĉar dum Dio estas amo kiu sin metas je la servo de la homoj, la diablo estas povo kiu ilin superregas.

La fariseoj do estas tiuj kiuj superregas, ankaŭ se pro religiaj kialoj, superregas la personojn; kaj ilin superregas en la nomo de Dio. Tio por Jesuo estas netolerebla. Kiu superregas, ankaŭ se li tion faras pro religiaj kialoj, en la nomo de Dio, estas ĉiam ilo de la diablo.

Alproksimiĝis por embarasigi Lin, demandis Lin... ili starigas al li demandon kies respondo estis antaŭvidita. Fakte ili demandas *ĉu estas permesite al viro divorci de sia edzino?*" Kompreneble jes, tion oni sciis. Neniu neis la eblon flanke de viro divorci de la edzino, la problemo estis koni la kialojn or tion fari.

Sed kial ili starigas tiun ĉi demandon? Ĉar ili vidas ke Jesuo parolas pri tiu amo por la tuta homaro kaj Jesuo ne distingas inter viro kaj ino. Do ili volas entiri Jesuon en medion, la familian, kie la povo de la viro, de la edzo super la edzino, estis nediskutebla. Kaj Jesuo ne respondas sed starigas alian demandon.

„Kion Moseo ordonis al vi?“ Strange Jesuo ne diras "kion ordonis al ni Moseo", ankaŭ Jesuo estis hebrea. Sed li distanciĝas de la leĝaro de Moseo. Por Jesuo ne ĉio kio estas skribita en la leĝaro, al kiu oni atribuas dian aŭtoritaton, ĝin reale havas. Jam en la antaŭĉapitro Jesuo deklaris puraj ĉiujn nutraĵojn.

Tiel estis la komento de evangeliisto Marko de la agado de Jesuo, kontraŭdira kun tio kio estis skribita en la libro de Levido. Parte tio kio estas skribita en la leĝaro estas cedo al la perversaj homaj inklinoj. Kion do ordonis al vi Moseo? *Kaj ili respondis: „Moseo diris: Se iu volas divorci de sia edzino, li skribu eksedziĝan deklaron.*

"Tiu eksedzigan deklaron ni trovas en ĉapitro 24 de la libro de la Readmono kie estas skribite: *Kiam viro prenis virinon kaj vivis kun ŝi kiel edzo, se poste okazas ke ŝi ne trovas afablecon en liaj okuloj ...*. Jen je la tempoj de Jesuo la diskuto estis pri kion signifas ne trovi afablecon, *ĉar li trovis en ŝi ion hontinda, skribu por ŝi eksedzigan deklaron kaj ĝin enmanigu al ŝi, kaj ŝin forsendu de la hejmo.*

Temis do pri paperfolio sur kiu la viro skribis: "Ekde hodiaŭ vi ne plu estas mia edzino" kaj ŝin forsendis. La kialo, la diskuto je la tempo de Jesuo celis kompreni kio povus esti ion hontinda. Nu, Jesuo respondas al ili: "*Pro la malmoleco de via koro*"... la koro, ni memoru tion, en la hebrea mondo estas ne nur la ujo de la sentoj sed signifas kapon, menson, konscion.

Pro la malmoleco de via koro, do, pro via sen indulgo... "*li skribis*" ... kaj plian fojon Jesuo distanciĝas. Dum la fariseoj referencas al Moseo kaj al Dio de la leĝaro, Jesuo referencas al la komenco de la kreado, *Dio kreis la homojn viro kaj virino. Pro tio la viro forlasas sian patron kaj sian patrino kaj aliĝos al sia edzino.*

Je tiu ĉi punkto Jesuo utiligas pecojn de la libro de la Genezo, kaj reliefigas la personan konsento, la geedziĝo estas kontrakto inter la familioj, Jesuo memorigas la originan planon. "*Pro tio la viro forlasos sian patron kaj sian patrino*". La patro estas tiu kiu certigas sekurecon, la patrino estas la senkondiĉa amo, *kaj aliĝos al sia edzino*. Kaj je tiu punkto Jesuo preterlasas la versiklon de la Genezo pri la fekundeco.

Por Jesuo tio kio gravas estas la kuniĝo de la viro kaj la virino, tiu amo kiu igas ilin unu. Fakte li diras: "*kaj ili estos unu karno*. Jesuo parolas pri du personoj kiuj trovas unu en la alian protekton, sekurecon eĉ pli grandan ol tiu kiun la patro povis certigi kaj senkondiĉan amon eĉ pli grandan ol tiu kiun la patrino povis proponi.

Kion Dio kunigis, tion homo ne disigu."Du personoj povas disiĝi, sed kiam ili iĝas ununura aĵo ili estas nedivideblaj, ĉar tio estus mutilado. Tio kion Jesuo diris ne kaŭzas reagon flanke de la fariseoj, sed flanke de la disĉiploj, por kiuj tiu novaĵo de Jesuo estas neakceptebla.

Kaj fakte, *kiam poste ili revenis en la domon, la disĉiploj denove demandis Jesuon pri la afero*. Do evidentas ke tio estis problemo tre kara al ili. Estas defendo de la religiaj institucioj, de la tradicio, kaj do Jesuo diris al ili: "*Kiu forsendas sian edzinon kaj edziĝas kun alia, tiu adultas kontraŭ ŝi; kaj se ŝi forlasas sian edzon...*"

Tio strangas ĉar en la hebrea mondo ne ekzistis por la virino la ebleco divorci de la edzo... Jesuo faras el tio universalan leĝon: "*kaj se ŝi forlasas sian edzon kaj edziniĝas kun alia, ŝi adultas.*"

Jesuo sin metas ĉiam je la flanko de la malfortulo. Estis akceptite tiutempe ke viro havu povon super la edzino tiom ke li povis ŝin forsendi. Por Jesuo tio estas neakceptebla. Jesuo ĉiam estas je la flanko de la malfortuloj. La peco komenciĝis kun tiuj kiuj estis je la pinto de la socio, la fariseoj, kaj finiĝas kun tiuj kiuj estis ĉe la bazo, ĝuste por evidenti la kontraston.

Kelkaj portis al Li infanojn, por ke Li tuŝu ilin. Sed la disĉiploj riproĉis ilin. La evangeliisto eĉ uzas la verbon `riproĉi', kion oni uzas por la demonhavantoj. Kiuj estas tiuj infanoj? Ne estas infanoj de ia romantikismo; la infanoj estas sensignifaj estaĵoj, la lastaj en la socio, tiuj kiu valoras nenion. Oni prezentas ilin al Jesuo por ke li ilin tuŝu, donu al ili vivon, nu la disĉiploj, kiuj enhavas tiujn dezirojn je superrego, je hierarkio, tion ne toleras kaj ilin riproĉas.

Kiam Jesuo ekvidis tion, indignis... La nura fojo en la tuta evangelio de Marko kiam Jesuo indigni gas... *kaj diris al ili: „Lasu la infanojn veni al mi; ne malhelpu ilin,* do tre energie Jesuo tion diras, *ĉar al tiaj apartenas la regno de Dio.* Kontraste al la fariseoj kiuj kredis ke, pro ilia sankteco, pro ilia observado de la ordonoj, estus meritontaj la regnon de Dio, Jesuo kontraŭmetas la lastajn en la socio.

Tio estas invito al la disĉiploj kiuj kverelas inter si por scii kiu estas la plej grava, iĝi la lastaj. Dio pro amo sin metis je la flanko de la lastaj kaj kiu volas esti en komuneco kun tiu Dio devas iĝi lastulo. *Jes, Mi diras al vi: Kiu ne akceptas la regnon de Dio kiel infano, tiu ne eniros ĝin.* "Por eniri en la regnon de Dio, la alternativan socion de Jesuo, necesas iĝi lastuloj.

Poste Li brakumis la infanojn, Jesuo do identiĝas en ili. *Benis ilin, metante la manojn sur ilin.* Jesuo do benas tiujn kiuj en la socio iĝas lastuloj, kiuj estas la plej proksimaj al li.